

100 JAROJ / 100 ANYS

KATALUNA ESPERANTISTO

La revuo *Kataluna Esperantisto* fariĝis 100-jara. Por tion omaĝi la historiisto Francesc Poblet proponas la sekvan kolekton de elektitaj artikoloj memorigantaj la historion de la revuo. Por scii pli pri *Kataluna Esperantisto* vi povas legi la artikolon “Kataluna Esperantisto (1910-1936)” de li mem publikigita en la revuo *Kataluna Esperantisto*, n-ro 334, aprilo 2005, kaj en la kataluna kaj en Esperanto en la libro *Historio de Esperanto en la Kataluna Landaro*.

La revista *Kataluna Esperantisto* ha fet 100 anys. Per commemorar-ho l'historiador Francesc Poblet proposa el següent recull d'articles seleccionats que repassen alguns dels moments més interessants de la seva història. Per saber-ne més, podeu consultar l'article “Kataluna Esperantisto (1910–1936)” de Francesc Poblet publicat en català a la revista *Kataluna Esperantisto*, núm. 334, abril 2005, i en català i esperanto al llibre *Història de l'Esperanto als Països Catalans*.

ENHAVO/ÍNDEX

•	Januaro/gener 1910, n-ro/núm. 1, frontpaĝo/portada	2
•	Junio/juny 1910, n-ro/núm. 3, p. 35	3
•	Februaro/febrer 1911, n-ro/núm. 11, p. 189	4
•	Januaro/gener 1912, n-ro/núm. 22, frontpaĝo/portada	5
•	Decembro/desembre 1914, n-ro/núm. 51, p. 84-85	6
•	Januaro/gener 1915, n-ro/núm. 52, frontpaĝo/portada	8
•	Septembro/setembre 1915, n-ro/núm. 60, p. 119	9
•	Septembro/setembre 1915, n-ro/núm. 60, p. 121	10
•	Januaro/gener 1917, n-ro/núm. 71, frontpaĝo/portada	11
•	Julio/juliol 1921, n-ro/núm. 7, frontpaĝo/portada	12
•	Oktubro/oktubre 1923, n-ro/núm. 34, p. 128	13
•	Januaro/gener 1925, n-ro/núm. 7, frontpaĝo/portada	14
•	Aprilo/abril 1925, n-ro/núm. 10, frontpaĝo/portada	15
•	Januaro/gener 1926, n-ro/núm. 19, p. 275	16
•	Januaro/gener 1926, n-ro/núm. 20, dorskovrilo/contraportada	17
•	Marto/març 1926, n-ro/núm. 21, frontpaĝo/portada	18
•	Aŭgusto/agost 1928, n-ro/núm. 48, p. 118	19
•	Septembro/setembre 1929, n-ro/núm. 1, frontpaĝo/portada	20
•	Julio/juliol 1930, n-ro/núm. 172, frontpaĝo/portada	21
•	Majo/maig 1931, n-ro/núm. 177, p. 83	22
•	Januaro/gener 1932, n-ro/núm. 178, reklamo/anunci	23
•	Majo/maig 1933, n-ro/núm. 194, p. 43	24
•	Aŭgusto/agost 1933, n-ro/núm. 196, reklamo/anunci	25
•	Marto/març 1934, n-ro/núm. 202, dorskovrilo/contraportada	26
•	Julio/juliol 1934, n-ro/núm. 206, p. 146-147	27
•	Januaro/gener 1936, n-ro/núm. 224, frontpaĝo/portada	28
•	Novembro/novembre 1936, n-ro/núm. 232, p. 1	28
•	Junio/juny 1982, n-ro/núm. 234, p. 3-4	29
•	Januaro/gener 23, n-ro/núm. 325, frontpaĝo/portada	32

KATALUNA ESPERANTISTO

MONATA GAZETO □ OFICIALA ORGANO DE LA KATALUNA ESPERANTISTA FEDERACIO
SENPAĜA POR LA ĜEFEDERACIANOJ

REDAKCIO KAJ ADMINISTRACIO
12. strato Gracia. — SABADELL
BARCELONA-HISPANUJO

AVIZO: La Redakcio konservas al si la rajton korekti laŭ bezone la manuskriptojn. Neakceptitajn manuskriptojn oni ne resendas.

ENHAVO: ;Saluton! — Nia deklaro. — Bela Sonĝo. — Flugadoj. — Mortanta Ĉagreno. — En la marbordo. — Mi rakontis. — «Lumon» al Castellar. — Pensoj. — Enlanda Movado. — Eksterlanda movado. — Bibliografio. — Oficiala parto.


!SALUTON!

MAJSTRO Zamenhof, kleraj kaj spertaj pioniroj de nia lingvo internacia, geesperantistoj, ceteraj gesamcelanoj de Hispanujo, enlandaj gesamideanoj: ĵus novnaskiĝinta familio, en Katalunlando — la lando bonvola kaj gastamema — konsistanta el geanoj diversaj, ĉiuj fervoraj, donas al vi fratan, aman ĉirkaŭprenon kaj manpremon de amikeco kaj saluto!

Vi, la eksterlandaj gazetoj, ĉefe la hispanaj, volu ankaŭ akcepti nian sinceran saluton, kaj volu cedi lokon simplan en via honorinda rondo al tiu areto malsperta, juna, kaj humila sed fervora kaj entuziasma, kiu celas, kiel vi, la venkon de Esperanto!

Al vi, «Tutmonda Espero» en nia lando la pioniro, kiu ricevis ĉiutempe nian kunhelpadon; niaj atestimataj amikoj kiuj ĉe tiu ĉi gazeto kunpartigis kun ni la klopodojn kaj penadojn de la esperanta disvastigado: akceptu nin bonvole, amike kun la estimo kaj afekcio ĝisnuna; al vi nian apartan koran saluton!

LA REDAKCIO



UNUA KUNSIDO ĈE LA GRANDA SALONO DE LA SABADELL'A URBDONO

RAPORTO DE LA UNUA KONGRESO DE KATALUNAJ ESPERANTISTOJ EN SABADELL

Tu ĉi Revuo, organo de la «K. E. F.» ne estas kiu devas komentarii kaj apologii la taskon faritan de la organizintoj de la Federacio kaj de la kongresistoj: al ni nur apartenas priskribi la laboron faritan per maniero klara kvankam konciza, por ke ĉiuj, same tiuj kiuj plenaj je sankta entuziasmo klopodadis kaj klopodadas por doni formon kaj vivon al la «K. E. F.», kiel tiuj aliaj, kiuj pro malgrandaniĝaj egoismoj, antipatioj personaj aŭ de partio kontraŭagis ĝian fondiĝon, povu juĝi la aferon juste kaj klare.

Tamen, ni ja devas konstatiĝi noble kaj malkaŝeme ke nia agado tute nin kontentigis kaj kuragigis por la estonto, ĉar ni havas firman konvinkon pri tio, ke alvenos tago, ne multe malfrua, en kiu kuniĝinte ĉiuj katalunaj esperantistoj ĉirkaŭ ni, ni havos tian tutan forton necesan por atingi unu el niaj celoj, kaj montri, ke la kataluna esperantistaro estas unu vera sola familio.

MOVIMENT DE CAIXA EN 1911 (1910?)

Poblacions	Socis inscrits	Qüotes cobrades	Pessetes	Cts.
Sabadell	42	40	120	
Ripollet	1	1	3	
Reus	12	12	31	50
Sant Llorenç Savall	1	1	3	
Vilanova i Geltrú	6	6	16	
Vic	24	16	48	
Barbarà del Vallès	3	3	9	
Balaguer	2	2	6	
Cambrils	2	2	6	
Olot	27	27	81	
Terrassa	53	50	150	
Aiguafreda	1	0	0	
Manlleu	9	9	27	
Barcelona	87	80	240	
Tarragona	8	8	24	
Premià de Mar	1	1	3	
Castellar del Vallès	2	1	3	
Tivissa	1	1	3	
Moncada	1	1	3	
Mataró	1	1	3	
L'Escala	1	1	3	
Berga	1	1	3	
Sant Feliu de Codines	1	1	3	
Arbós	6	6	18	
Vendrell	2	2	6	
Igualada	6	4	12	
Girona	7	7	21	
Vilafranca de Penadès	2	2	6	
Caldes de Malavella	1	0	0	
Borges Blanques	1	1	3	
Total socis	312	287		
Entrega de la societat « Esperanta Senio » a « K. E. F. », sobrant de la subvenció de l'Ajuntament de Sabadell a dita entitat			175	
Exemplars de K. E. venuts <i>postumum</i>			6	40
Total entrats a caixa			1,055	90

KATALUNA ESPERANTISTO

MONATA GAZETO □ OFICIALA ORGANO DE LA KATALUNA ESPERANTISTA FEDERACIO
SENPAĜA POR LA GEFEDERACIANOJ

REDAKCIO KAJ ADMINISTRACIO
12. strato Gracia. — SABADELL
BARCELONO-HISPANUJO

REDAKTORO:
Frederich Pujulà

— NIA DEVIZO : « MARO ESTAS GUTARO » —

ENHAVO : *Feliĉan Novan Jaron*, Komitato de «K. E. F.» — *Pri...*, Fred. Pujulà. — *Rezignacio*, E. Pellicer (traduko el Victor Català). — *Klarigo*, K. E. — *Historio de Esperanto en Katalunujo (Ulldemolins)*, Doktoro Pallejà. — *Katalunaj efemeridoj*. — *Enketo*, R. Martorell. — *Enlanda Movado*, K. E. kaj Korespondanto. — *Ailanda Movado*, E. Pellicer. — *Oficiala parto*, «K. E. F.». — *Korespondado*, Red. kaj Adm.



FELIĈAN NOVAN JARON!

La «Kataluna Esperantista Federacio» deziras feliĉan novan jaron al la progresado de Esperanto kaj al ĉiu homo batalanta por ĝi. Al la Majstro ĝi plej respektive sendas kun la novjara saluto la esprimon de sia ĉiam pli firma fideleco

En la nomo de 38 grupoj kaj 400 membroj ĵuzoj, la Komitato de «K. E. F.»: Dro. Bremón, prezidanto; Pastro Planas, vic-prezidanto; Sro. Piferer, kasisto; Sro. Pellicer, sekretario.

La Granda Milito

MILITO deligis sian furiozon en la tuta mondo depost la komenco de Aŭgusto, en la momento kiam la esperantistaro estis preta okazigi sian plej grandan kongreson, solenan feston de Paco. Ĉion avidanta, freneza torento, Milito forglutas el la mondo civilizita la plej noblajn sentojn, ilin anstataŭigante per malsuperaj semoj de malamo kaj ruinigemo. Milito malhelpas, renversas normalan vivadon de l' popoloj, minacante ilin per terura mizero. Milito disfaligas kaj premas la belajn idealojn kaj senrevigas la spiritojn. Ĝi malutilas, vundas, mortigas ĉion.

Al ni, esperantistoj, la granda milito kreis la plej gravan baron, kiun nia ideo renkontis en sia malfacila vojo. Ĝi detruis la jam florantan rezulton de penoplena longa agado, ĝuste kiam ni volis prezenti al la rigardanta homaro la konvinkan konstaton pri la efektiviĝo de *utopia* revo: starigo de lingvo internacia. Ni vidis, kun ega doloro, kiel degelas en niaj manoj la mirinda konstruaĵo, kies altan supron ni preskaŭ atingas, sub la arda blovo de l' milita ventego. Kaj ni perdis konscion.

En la nuna momento nian koron premeblas la penso, ke multe da niaj amikoj kaj samideanoj, same amataj de ni, troviĝas kun pafilo en la mano unuj kontraŭ la aliaj, pretaj por kruela mortigo, kvankam ili ankoraŭ kunvivas spirite ĉe la altaro de frateco. Ho, kiom dolora penso!

Ĝi vekas en ni, tamen — domaĝe, ke tiel multekoste — la deziron nin oferi denove al laboro efike disvastigi nian karan ideon, por eviti en la estonteco alian similan katastrofon. Ni vidas klare, kiom multe paco valoras, kaj en nia egoista baraktado por vivi ni komprenas, ke la savo ekzistas nur en la fratigaj idealoj, kies efektiviĝon malhelpis ĉefe tiuj homoj mem, kiuj nuntempe riproĉas al ili ilian nulan efikon kontraŭ la apero de milito. Jam de nun, kaj post ĝia fino des pli multe, instigos nin labori, la sentebla reago kontraŭ la malpacigaj klopodoj, la ĝenerala orientiĝo al la humanaj solvoj, kiuj estos la rezultato de la hodiaŭaj sangaj batalegoj.

La Homaro, simile al individuo suferinta malsanon, evitos pro instinkto kiam ĝi resaniĝos je la abomena kancero, rodanta ĝian karnon, la ideojn portintajn tiel terurajn sekvojn, kaj akceptos volonte, tiujn — kiel la nia — celantajn al ĝia bono kaj perfektigo. Ni devos profiti de la okazo, kaj montrante la utilojn de nia lingvo sper-

titajn de ĉiuj batalantaj popoloj en tre diversaj cirkonstancoj, ĝian uzadon dum la milito por plej malsimilaj celoj, alligi al ĝia nobla ideo la progresemajn animojn, la sindonemajn homojn, kiuj ankoraŭ restas for el nia rondo. Ni devas montri al la mondo, kiu hodiaŭ povas nur admiri la dise restantajn ŝtonojn de nia konstruo, kiel bela ĝi estas, kiam post la nubego de malamo kreita de la malhumana batalado aperos la hela suno de Paco, brilante super la homoj reciproke sin amantaj kiel fratoj, danke al la glormerita laboro de la partianoj de nia kara lingvo.

JOSEF GRAU



Pro Milito

Nia kara Direktoro, S-ro Fred. Pujulà, kiu veturis Francujon okaze de la Dekka Kongreso por partopreni en ĝi kaj resti apud Parizo la tutan someron, estis mobilizita la 1^{ma} de Aŭgŭsto, kaj enkorpusiĝis al 32^a Teritoria Regimento de Infanterio. Niaj kunfederaciaj komprenoj nian ĉagrenon pro la foresto de nia amata amiko kaj lia dangera restado sur la batalejoj. La sciigoj, kiujn de li ni ricevis, estas sufiĉe kontentigaj : malgraŭ lia aktiva partopreno en la bataloj dum bajonetaj atakoj, daŭraj pafadoj, ĉe enterigoj k. t. p., k. t. p., li bone fartas kaj konservas sian kutiman spriton.

Lia edzino, s-ino Rebours, sekretariino de la V^a Kongreso Internacia, suferis la bedaŭrindajn sekvojn de la germana invado, kaj devis forlasi sian patran domon en Lagny s. Marne kaj rifuĝi en Clermont Ferrand, kie ŝi naskis sanan kaj belan idon Jordi Pujulà, estonta kunbatalanto nia. Niaj gratuloj kaj bondeziroj por la okazo estas esprimitaj al ili kun ĉagrena koro pro la doloraj cirkonstancoj.

Ni deziras ke la Sorto estu favora al niaj geamikoj ĝis fino de la milito, por ke ili povu baldaŭ ĝui denove en sia hejmo sian vivon de l' pactempo.

— Alia samideano nia, S-ro Mattes, estis entirita al la milito, kiel franca soldato. Laŭŝajne li estis mortigita jam en la komenco de la milito, kvankam aliaj sciigoj diras, ke li estas kaptito de la germanoj. En tiu malgaja necerteco, ni preferas kredi la duan supozon kaj deziras plejbonon al nia kara amiko.





Nia devizo: *Maro estas gularo*

KATALUNA ESPERANTISTO

OFICIALA ORGANO DE LA
Katalana Esperantista Federacio

Asocio sidejo de la K. E. F. : Bamba, 41 : Sabadell (Katalunjo)
Redakcio kaj Administracio de K. E. : Arbon, 55 : Barcelona

AL LA TUTA ESPERANTISTARO
PACAN 1915^{an} JARON
DEZIRAS EN LA NOMO DE LA
KATALUNA ESPERANTISTA
FEDERACIO

La Komitato

ĉiutage du kursoj de Esperanto, por viroj kaj por virinoj. Ni intencas okazigi esperantistan feston, kiu certe multe helpos la disvastiĝon de nia lingvo en nia vilaĝo. — *La Delegito.*

TARRAGONA. — La *Ekskursa fako de Tarragono Esperanta* daŭrigis siajn aranĝitajn ekskursojn por la nuna somero. La kvina okazis al *Reus*, la sesa al *Tamarit* kaj *Ferrán*, la sepa al *Allafulla* kaj la oka al *Constanŝ*. Nune oni aranĝas gravan ekskurson al *Vilanova i Geltrú* okaze de la VI Kongreso de K. E. F. la tagon 17^{aa} de la venonta Oktobro.

La tarragonaj kongresanoj eliros per la vagonaro de la 6'46 matene. Estas multaj la ĉi tieaj samideanoj, kiuj sin enskribas por iri amase al la Kongresurbo inter kiuj estas entuziasmaj samideanoj. Ankaŭ ĉeestos reprezentantoj de kelkaj grupoj de tiu ĉi provinco.

Tarragono Esperanta por faciligi la ĉeston al tiu ekskurso petis al la fervoja Kompanio M. Z. A. gravan rabaton. Oni povas sin enskribi ĝis la 1^a tago de la venonta monato.

— Ni ricevis la agrablan viziton de niaj diligentaj samideanoj S-roj Henriko Guitart kaj Amades Martorell, prezidanto kaj profesoro respektive de *Fratego*, el Vendrell. Ili salutis la ĉi tieajn samideanojn kaj parolis tre fervore pri la esperanta movado en nia provinco kaj pri la proksima Kongreso de K. E. F.

— La kara edzino de nia bona amiko S-ro Daniel Roig, Vic-prezidanto de la *Ekskursa fako* de T. E. naskis belan filnon. Niajn gratulojn. — *La Korespondanto.*

TERRASSA. — La 18^{aa} de Julio okazis teatra prezentado, kiu estis granda sukceso.

— La 25^{aa} de la sama monato je la 6^a vespere okazis la disdono de premioj de la laste okazinta konkurso; post parolado de S-ro J. Ventura kaj recenzo de la verkoj prezentitaj, la premiitoj S-roj V. Alavedra kaj R. Vergés legis siajn verketojn, kiuj estis tre aplaudataj; la premioj estis la libroj «*Travivaĵoj de Ro Ŝo*» kaj «*Portreto*», de Gogol.

— La 8^{aa} de Aŭgusto nokte okazis denove teatroludado en nia scenejo.

— La grupo *Lumon* interkonsente kun *Aplec* kaj *Katoliĥa Stelo* de Sabadell organizas grandan ekskurson al Ermitejo de Sant Julià; ĝi okazos en la lastaj tagoj de tiu ĉi monato. — *La Korespondanto.*

VALENCIA. — Pro la klopodoj de la tiea grupo, estas eldonita en Esperanto la oficiala programo de la Foiro okazinta la 22^{aa} Julio-2^{aa} Aŭgusto. Ĝi tre bele aspektas kaj estas prezentita sub kovertoj kun la valencia blazono en kolora reliefo. Gratulojn al la valenciaj esperantistoj pro la bona propagando per ĝi farita.

VENDRELL. — La nombro de novaj samideaninoj ĉiutage kreskas, danke al la senlaca propagando de F-ino Maria Julivert.

Inter la geesperantistoj de nia urbo ekzistas granda entuziasmo por ĉeesti la proksiman VI^{aa} Kongreson de K. E. F. en Vilanova i Geltrú. — *La Korespondanto.*



VILANOVA I GELTRÚ : *Muzeo-Biblioteko Balaguer*. — Rimarkinda konstruaĵo konservanta la nomon de sia fondinto, fama verkisto kaj historiisto. Ĝi posedas ĉirkaŭ 40 mil volumojn, kaj en la Muzeo, krom numismatika kolekto da 7 mil moneroj, troviĝas 5 mil diversaj objektoj : pentraĵoj, statuoj, juveloj, armiloj, k. t. p.

VI KONGRESO DE KATALUNA ESPERANTISTA FEDERACIO

VILANOVA I GELTRÚ
16-17-18 OKTOBRO 1915



Nia devizo: *Maro estas gultaro*

KATALUNA ESPERANTISTO

OFICIALA ORGANO DE

Katalana Esperantista Federacio,

DE Baska Esperanta Federacio KAJ
DE Aragona Esperantista Federacio

Redakcio kaj Administracio:
Diputació, 280 : Barcelona

D-ro LAZARO LUDOVIKO ZAMENHOF

mortis en Varsovio la 14^{an} de Aprilo de 1917^a

Jus ĉe la kompostado de tiu ĉi numero de nia gazeto atingas nin la dolora sciigo pri la morto de nia kara Majstro. Terura estas la malfeliĉo kiu falis sur la esperantistaron kun la morto de ĝia glora kondukanto.

Ĉiu esperantista koro rememoros en tiu ĉi momento kun emocio la grandajn meritojn, la bonecon kaj modestecon kiuj ornamis la elpensinton de Esperanto kaj kiuj vekis profundan, nepereigeblan simpatian en la koro de tiom multe da homoj diverslandaj kaj diverslingvaj. La memoro pri lia granda verko neniam malaperos el la penso de la homoj.

Ni ne povas en tiu ĉi numero dediĉi al lia memoro kaj al lia vivo plene donita al la homaro la spacon kiun ili meritas; ni faros tion en la venonta numero ka ni tiel pagos lamaniere la ŝuldon kiun la esperantistoj havas al li.

Al lia bonkora edzino, al liaj simpatiaj gefiloj kaj fratoj, ankoraŭ dolorigitaj de la morto de lia frato Aleksandro, KATALUNA ESPERANTISTO sendas en la nomo de la Komitato de K. E. F. kaj de ĉiuj federacianoj la esprimon de sia kora kondolenco.



KATALUNA ESPERANTISTO

OFICIALA ORGANO DE

Kataluna Esperantista Federacio

Redakcio kaj Administraĵo :
Carme, 30 : BARCELONA

Nia devizo: *Maro estas gataro*

Optimismo

AGRABLAN sciigon ni kredas doni al la legantoj de KATALUNA ESPERANTISTO, anoncante ke jam de la nuna numero nia kara gazeto estos, kiel antaŭe, deksepaga. Post nur duonjaro de ĝia nova vivo, estas ĝoje konstati ke tia plibonigo estis ebla.

KATALUNA ESPERANTISTA FEDERACIO preskaŭ reatingis sian antaŭan brilon kaj forton. La nuna nombro da federaciaj grupoj estas 392, loĝantaj en 46 urboj kaj vilaĝoj tra la tuta Katalunujo. Estas aliĝintaj al la Federacio 16 vivoplenaj Grupoj, el Barcelona, Sabadell, Terrassa, Girona, Reus, Tarragona, Vendrell, Manlleu, Santa Coloma de Farnés kaj Vilanova i Geltrú.

Post kelkaj monatoj, en Girona, la sukcesego de nia IX.^a Kongreso, kun la hela festo de la Floraj Ludoj, estos impona pruvo de la valoro de nia lingvo kaj de la intenseco de nia enlanda movado.

Tiaj faktoj kuragigu nin al persista laboro. Ĉiu varbu al Esperantismo novajn adeptojn kaj al nia organizaĵo novajn subtenantojn. Kaj ni agu ĉiam kun plena certeco ke ni venkos, per senlaca laboro, per obstina fido, per la forto de nia entuziasmo.

J. G.

“Kataluna Esperantisto” mortas...

Kun granda ĉagreno ni sciligas al niaj legantoj, la katalunaj esperantistoj kaj kelke da karegaj eksterlandaj amikoj, ke tiu ĉi numero de nia gazeto estas la lasta...

Nia kara «Kataluna Esperantisto», pri kiu, kompreneble, ni mem ĉiam evitis fari laŭdojn, sed kiun, en la nuna momento, ni trovas tiel bona, plaĉa kaj estiminda, mortigas kvazaŭ subite, sufokata de nespirebla aero.

Diversaj kaŭzoj kunefikas por malebligi la ekziston de «K. E.» Financaj malfacilaĵoj, milfoje aluditaj, premas la Katalunan Federacion, kiu dum dek jaroj subtenis nian gazeton; troa ŝarĝo pezas sur la homaj ŝultroj de nia Redaktoro, kies fervoro estas neelĉerpebla sed ne sufiĉas tamen por venki la laciĝon; grava kaj malagrabla malhelpo estas por la funkciado de nia Direkta Komitato la fermiĝo de la «Enciklopedia Popola Ateneo» (kiu malavare donas loĝejon al la «Kataluna Esperantista Federacio»), fermiĝo okazinta laŭ ordono de la Madrida registaro; ĝena komplikaĵo fariĝas ankaŭ la regimo de milita cenzuro por la gazetaro, al kiu ankaŭ «K. E.» devas submetiĝi...

Pro la diritaj kaŭzoj, do, «Kataluna Esperantisto» ne plu aperos. Ni firme esperas, tamen, ke estos eble aperigi anstataŭ ĝi malpli vastan presorganon.

La malapero de «K. E.» neniel influas la bonan disvolviĝon de la preparaj laboroj de nia proksima kongreso, nek la regulan funkciadon de la Federacio, nek la organizadon de la X^a Internaciaj Floraj Ludoj, kies «Atvokon» kaj plenan liston de premioj ni publikigas hodiaŭ. Eĉ ni diros ke, en la fundo de la koro, ni havas la esperon ke la malapero de nia gazeto ne estos definitiva. Eble ĝia morto ne estos vera morto, sed nur vintra dormado...



La nuna numero estas submetita al la milita cenzuro.

Ni esprimas nian dankon al la bona samideano S-ro Luis Santamarina, polica oficisto, kiu afable helpis nin en tiu ĉi afero.



KATALUNA ESPERANTISTO

OFICIALA ORGANO

DE LA KATALUNA ESPERANTISTA FEDERACIO KAJ
DE LA INTERNACIAJ FLORAJ LUDOJ

Sia devizo: *Maro estas gataro*

Redakcio : Carrer València, 145 - BARCELONA

La kiso sur la okuloj

Pro abelfluga kis' subita,
okul' kliniĝas kvazaŭ flor';
kaj en okul', pro tim' fermita,
pupilo batas kiel kor'.

Kis' sur okul'... Ho, kia brilo,
de mia kiso sub la varm',
en la de tim' plena pupilo,
kvazaŭ birdet' en iu man'!

Aromas jam estonta ploro
sub la palpebroj en ridet';

kaj kun flugila mov-fervoro
batas pupil' en malkviet'.

Kaj ĉirkaŭ ni la tempo fluas
en faŭk-abismon en mallum'.
Mi ĉe l' okuloj viaj guas,
de viaj vidoj je l' parfum'.

En kaptitec' via pupilo,
kiel alaŭdo en la man',
movadas sin kvazaŭ flugilo
por flugi for kun arda varm'...

GABRIEL ALOMAR

(Baleara poeto)

El la kataluna lingvo tradukis

JAUME GRAU CASAS

KATALUNA ESPERANTISTO

OFICIALA ORGANO DE LA KATALUNA ESPERANTISTA
FEDERACIO KAJ DE LA INTERNACIAJ FLORAJ LUDOJ

Redaktoroj: S. Alberich - Jofrè, Delfi Dalmau, Marian Solà

LA SOLUCIÓ JUSTA

Eus tornem esperantistes. Comprenem cada vegada més la necessitat d'una forma de llenguatge que, sense perjudici de les diversitats nacionals i regionals, serveixi perquè tots els homes s'entenguin. A cada moment sentim a dir que convé expressar-se de manera que ho compreguin el més gran nombre possible d'homes. Partint d'aquest principi, s'arriba lògicament a la solució que presenta una parla internacional.

Cap dels idiomes d'avui, ni els grans ni els petits, ni els gloriosos ni els humils, ni els antics ni els nous, ni formosos ni llejtos, posseeix el do de la universalitat. Els uns tenen una major àrea que els altres. N'hi ha de recloure dins els límits propis, i n'hi ha que saltant per damunt d'aquests límits són coneguts per altres homes de divers llenguatge nadiu. Però sempre hi haurà milers i milions d'homes que davant d'un text escrit en una llengua particular i fins en dues o tres o quatre llengües, es quedaran sense saber el que allò diu.

Si realment és desitjable i fins necessari que un text determinat sigui entès per tothom, en aquest cas no és lògic d'aturar-se en la solució eclèctica que representa l'ús dels idiomes de major àrea territorial. Més val anar a la solució completa, perfecta i definitiva, que consisteix a posar al costat de cada llengua materna una llengua auxiliar igual per a tots.

Tal hauria d'ésser la tesi de tots els que es presenten com a universalistes lingüístics. Els que ara propugnen, per a resoldre el problema, l'adopció d'algun dels tres o quatre idiomes que avui tenen una difusió més gran, haurien d'avenir-se per arribar a la solució única, que no pot ésser la d'un llenguatge dels que ara són parlats. La defensa de llurs deficientes solucions podria confondre's amb l'esperit de privilegi idiomàtic. Es podria creure que volen, no solament facilitar les relacions lingüístiques entre els pobles, sinó atavorir unes llengües a costa d'unes altres.

Cal que l'universalisme lingüístic sigui desinteressat, és a dir, que no beneficiï particularment a cap llengua. Si es cau en aquest escull, ha de venir forçosament la competència entre els llenguatges que ocupen els primers llocs en les estadístiques d'idiomes. Al contrari, un llenguatge verament universal que serveixi, no per a l'ús interior dels pobles, sinó simplement per a la comunicació amb els que tenen una altra parla, no ofereix cap dels inconvenients al·ludits.

A. ROVIRA I VIRGILI

El Objektivaj Recenzoj pri la «Kataluna Antologio»

(El «*Esperanto*» de U. E. A.)

«Ofte ni plendis pri malgraveco kaj maldikeco de esperantaj presajoj. Kataluna Antologio feliĉe surprizas per la malaj kvalitoj. Ĉiel laŭdinda ĝi estas. Belega libro, riĉa enhavo, neta preso sur luksa nurlina papero, vera libramanta eldonaĵo, bibliotek-ornamo, ties fiero kies posedajo. Ne nur la eksterajo estas plaĉa; ne malpli valora la teksto mem. Serioze scienca en la historiaj, lingvaj literaturaj studoj, kaj ankaŭ ĉarma legaĵo en la antologia parto, aro da poezioj, skizoj, humorajoj, noveletoj. La kompilinto kaj verkinto de la plej multaj tradukoj versaj kaj prozaj, S-ro. Jaume Grau Casas, konfesas, ke li oferis multjaran laboron por realigi sian celon. Li sinceran gratulon meritas de la esperantistaro, kiel ankaŭ liaj samnaciaj kunhelpintoj. Amo al patrujo kaj deziro diskonigi ĉien ĝian spiriton kaj literaturan trezoron, fervoro al Esperanto, ilo de internacia reciproka kompreno kaj ŝato, jen ambaŭ sentoj, kiuj instigis, kuraĝigis la ĉeflaborinton. Lia moto estis: «Ni volas honori la lingvon de niaj prapatroj per la lingvo de niaj prapnepoj».

G. S.»

(El «*Heroldo de Esperanto*»)

«Kio? Literatura verko, volumo pli ol 400-paĝa? Ĉu vere? Ĉu vi surprizite ne diris tion, fidela «Heroldano», leginte la titolon? — Efektive, ĝi ekzistas, ĵus naskiĝis, verko inda je nia plej serioza atento kaj je nia sentima admiro. — Antologio! Nur antaŭ nelonge mi parolis ĉiloke pri antologioj (bulgara kaj pola antologioj) kaj opinias ripeton superflua. Sed mi certigas via, ke la K. A. estas kaj estos senrivala laŭ ĉiuj vidpunktoj. — El du fontoj fluegas abunde la nektaro de arto kaj poezio en nia Esperanto-literaturo: Budapeŝt kaj Barcelona.

... Grau Casas kaj aliaj katalunaj samideanoj faris la tradukojn senescepte bonegaj, artismaj. Menciinda estas nepre la unuakvalita papero kaj la senripoĉe klara preso, kiu ne lacigas la okulon. — La librego ne estas multekosta rilate al ridinde etaj broŝuroj, kiuj svarmas en nia literaturo kaj kies elveno ofte estas duberajta. La prezo absolute ne egalvaloras la gigantan laboron de la kompilinto kaj de la fervoraj kunhelpantoj: tre modesta ĝi fakte estas. — Ni elkore danku niajn katalunajn fratojn por ilia faro kaj aĉetu la verkon. La servo, kiun ili faris al sia patrolando kaj al nia Esperantujo, trovos brilan rekompencon.

M. BUTIN, L. K.»

"Kataluna Esperantisto"

CIUMONATA 16-PAĜA GAZETO
OFICIALA ORGANO

DE LA

Internaciaj Floraj Ludoj

Plej bonaj verkajoj de plej bonaj
aŭtoroj ĉieaj.

Tradicie tre bona laŭ stilo kaj preso.

Jarabono: 6 svisaj frankoj aŭ 1'50 usonaj
dolaroj aŭ egalvaloro efektivebla en
Barcelona.

Adr.: Carrer València, 245-BARCELONA

Ĉiuj gazetoj kiuj bonvolos represi nian anon-
con, rajtos similan pri si, por kio bonvolu sendi
tekston publikigotan.

TAŬGA kaj MALKARA por la LERNANTOJ

Kontraŭ antaŭpago de UNU PESETO
per poŝtmarkoj, ni sendas sor-
timenton da

DEK EKZEMPLEROJ de ESPERANTAJ
GAZETOJ. (ne aktualaj)

ESPERANTO de U. E. A.

ESPERANTO TRIUMFONTA
KATOLIKA MONDO, k. t. p.

Mendoj: J. HERP

Carrer València, 245 - BARCELONA

KATALUNA ANTOLOGIO

KOMPILITA DE

JAUME GRAU CASAS

416 paĝoj 22 × 16

Prezo: 12 pesetoj. Aŭfrankite: 2 dolaroj, 11 svisaj frankoj aŭ 9 ŝi-
lingoj. En la Iberia duoninsulo 13 pesetoj aŭfrank.

Por mendoj oni turnu sin al S-ro. Eduard Capdevila, str. Car-
ders, 29. Barcelona.

Laŭ la juĝo de kompetentaj esperantistoj, la KATALUNA ANTOLO-
GIO estas unu el la plej valoraj verkoj en Esperantujo.

Aĉetu baldaŭ la libron kaj diskonigu tra la tuta mondo la altan
gradon de kulturo de la miljara kataluna lingvo.

KATALUNA ESPERANTISTO

OFICIALA ORGANO DE LA KATALUNA ESPERANTISTA
FEDERACIO KAJ DE LA INTERNACIAJ FLORAJ LUDOJ

JARABONO: 6 SV. FR. AU 1'50 USONAJ DOLAROJ AU EGALVALORO EFEKTIVGEBLA EN BARCELONA

Redaktoroj: S. Alberich-Jofrè, Delfi Dalmau, Jaume Herp

ESPERANTO I RADIOFONIA

La nova emissor de "Ràdio Barcelona"

Atentament invitada la «Kataluna Esperantista Federacio» a assistir el dia 25 de febrer a la inauguració oficial de la nova i potent emissor que «Ràdio Barcelona» ha instal·lat al cim del Tibidabo, hi fou representada pel nostre amic Angel Valdepeñas, soci de la «Asociació Nacional de Radiodifusió» i membre de la «Penya Ràdioesperantista».

Felicitem coralmnt «Ràdio Barcelona» (que tantes amistats compta entre els federats de la K. E. F.) perquè amb el nou esforç realitzat, demostra com és veritat el generós ideal de cultura que anima els seus dirigents, que ja s'evidencià en la antiga emissor en establir-hi conferències i cursos d'Esperanto com es fa en les més importants estacions europees i americanes. (Madrid, Paris, Roma, Berlin, Lelpzig etc. etc.).

L'esperantisme mundial, que té ràdioistes tan eminents com Mr. Mesny, Mr. E. Belin, el Dr. Privat i altres, celebra aquest nou progrés en el moviment radiofònic, i espera amb anhel el festival esperantista que el dia 7 d'abril serà radiat des de la alta antena de «Ràdio Barcelona».

Invito Persona al S-roj. Rómulo S. Rocamora kaj Julio Mangada Rosenörn

Pro denuncoj kaŝaj kontraŭ mi faritaj al la Provincestro, hodiaŭ, la 22an. de aŭgusto, mi devis ekŝigi de la Prezido de nia Federacio mi ricevis ordonon fermi mian profesian laborejon, dum pli definitivana ordonon mi atendas kiel rezulton de tiuj denuncoj.

Nia Kongreso nunjara okazos post kelkaj tagoj ekster Katalunujo en nia frata regiono Valencia, en nia komuna ŝtato hispana.

Tie, en la ĉarma urbeto Vinaroç, sub patronado kaj prezido de oficialaj aŭtoritatoj, ni kongresos kiel jam dufoje ankaŭ ekster Katalunujo, en Majorko.

Tie, malkaŝe, antaŭ la kongresanaro, kie la vero pri nia agado estas konata de multaj, se tiam mi ne estos en malliberejo aŭ ekzilo, mi atentos vin, vi diru publike, responde, niajn pekojn, kulpojn aŭ krimojn.

Nia Federacio estis ĉiam superordinare malavara. Ĝi abunde pagos vin por la klarigoj. Generale ni ne demandis aŭ prizorgis ĉu esperantisto estis aŭ ne kunfederaciano aŭ membro de Grupo aliĝinta, eĉ por nomi lin Komitatano. Honorige ankaŭ nia Federacio enskribis samĉeanojn el iu ajn regiono aŭ lando, kiam ĝi ricevis de ili favoron, fervoron, servon aŭ honoron. El ĉi ajn regiono aŭ lando, kvazaŭ divene ke iam, kiel efektive nun, ĝi ne povus uzi sian devenan lokadjektivon en sia nomo. Goje, naive ni premios vin se vi venos lumigi niajn kunvenon per via scio, sento, parolo.

Aŭdi preta, respondi diligenta, danki malaavara, mi, simpla federaciano, vin atentos. vin atentos dum nia Kongreso en Vinaroç.

KATALUNA ESPERANTISTO

Monata organo
de Katalun-Baleara
Esperantista Federacio
(K. E. F.)

Adreso:
Durán i Bas, 8, pral.
Barcelono



Dejorhoroj:
labortagoj de la 6.^a ĝis
la 8.^a vespere

Kunvenoj de la Komitato:
Jaŭde, de la 10.^a ĝis
la 12.^a nokte

Direktoro: JOZEFO ANGLADA

Redsktoroj: FRANCISKO GORGUES kaj JOZEFO GRAU QUERALT

KATALUNA ESPERANTISTO

ORGANO DE LA KATALUNA ESPERANTISTA FEDERACIO
KAJ DE LA INTERNACIAJ FLORAJ LUDOJ

ADRESO: Duran i Bas, 8 - BARCELONA

JARABONO:

Enlande: 5 pesetoj
Eksierlande: 6 pesetoj

DIREKTORO:

JAUME GRAU CASAS, L. K.

EDITORIAL

Amb esperit de sacrifici i desitjant salvar la "Federació Esperantista Catalana" de la més forta crisi que mai hagi sofert, empenem altra vegada la publicació d'aquesta revista.

Volem fer-la servent fidelitat a la tradició de la K. E. F. i mostrant una continuïtat encoratjadora... Però no podem fer-nos solidaris dels qui darrerament han prostituït la nostra ànima i han ignorat la història de la nostra Federació i de la nostra Revista. No es podran queixar, doncs, que els foragitem de la nostra llar i de la nostra memòria.

Considerem autèntics els números de l'òrgan oficial de la K. E. F., que indiquem a continuació, publicats en diverses èpoques sota la direcció de Domènec Sardà, Frederic Pujulà, Josep Grau Casas, Marian Solà, Jaume Grau Casas, Delfi Dalmau i S. Alberich Jofré:

× "Kataluna Esperantisto". (Primera època). Núms. 1-71.

"Bulteno de la K. E. F." Núms. 1-13.

× "Kataluna Esperantisto". (Segona època). Núms. 1-36.

"L'Esperantista Català". Núms. 1-3.

"Kataluna Esperantisto". (Tercera època). Núms. 1-48.

I com que han sortit, en total, 171 números *genuïns* del nostre òrgan oficial, donem al present quadern de "KATALUNA ESPERANTISTO" el número 172.

Des d'ara "Kataluna Esperantisto" sortirà cada dos mesos, en quaderns de 16 pàgines. Subscripció: Ptes. 5 a l'any. (La subscripció corresponent al segon semestre de l'any actual, val solament Pessetes 2'50). Del sosteniment i administració de la nostra revista,

PRI LA NACIA LIBERECO DE KATALUNUJO

Multajn gratulojn de eksterlandaj esperantistoj ricevis ni katalunoj okaze de la proklamo de la Hispana Respubliko kaj de la rekono de la Aŭtonomio (self-government) de Katalunujo. Plej koran dankon al ĉiuj!

Aparte ni devas danki niajn flandrajn amikojn, duoble samideanojn, pro ilia simpatio al ni. En speciala artikolo ni raportas pri ilia sinteno.

* * *

La 14. aprilo 1931, je la 1^a p. t. m., estis proklamata en Barcelono la Kataluna Respubliko, sub prezido de S-ro Francesc Macià.

En la sama tago, kelkajn horojn poste, estis proklamata en Madrido la Respubliko Federacia Hispana, al kiu apartenas federacie la kataluna ŝtato, nun ne plu nomata oficiale respubliko, sed: Generalitat de Catalunya. La unua sekvo estis la oficialigo de la kataluna flago (antaŭe malpermesita eĉ en privataj rondoj) kaj la enkonduko de la kataluna lingvo en la publikaj lernejoj kaj en la Barcelona Universitato.

* * *

Nia Kataluna Esperantista Federacio sendis la jenan leteron: Barcelona, 27 d'abril de 1931.

Senyor Francesc Macià, President del Govern de la Generalitat de Catalunya. — Ciutat.

Honorable senyor: La "Federació Esperantista Catalana", en asamblea general celebrada el dia 19 del corrent, prengué l'acord de felicitar-vos entusiàsticament i palesar-vos la seva profunda adhesió al President del Govern de la Generalitat de Catalunya.

La nostra Federació, que des de 1909 treballa per tal de propagar a Catalunya la llengua auxiliar internacional ESPERANTO amb caràcter de *segona* llengua per a tothom, ha reconegut sempre com a *primera* llengua dels catalans la parla acolorida de Bernat Metge, i conseqüentment avui exulta amb autèntica joia.

Utopistes com érem, avui velem en el reconeixement dels drets de la llengua catalana el triomf de la meitat del nostre ideal, tot esperant que en el dia no llunyà la llengua internacional Esperanto s'imposi, per a la major comprensió i efectiva germanor de tots els pobles de la terra.

El Secretari, *Eduard Capdevila*. — El President, *S. Alberich-Jofre*.

Hi ha una manera indirecta de protegir a la
Federació Esperantista Catalana:

Comprar les coses que ella patrocina.

Kataluna Antologio

(segona edició)

Antologia de poetes i prosistes catalans en Esperanto. - 416 pàgines de text. - Preu: 10 pessetes.

Primer Manual de la Llengua Auxiliar Internacional Esperanto

Edició de 4.000 follets al preu de 25 cènts. exemplar. - Comandes des de 25 exemplars, 20 % de rebaixa.

Zamenhof-disko

Disc fonogràfic amb la veu del Mestre, impressionada amb motiu del 5.^è Congrés Universal d'Esperanto a Barcelona en 1909.

L'únic disc al món que guarda la veu de l'autor de l'Esperanto.

Edició única de 50 discos!

Preu: 10 pessetes. - (Despeses d'embalatge i transport apart).

Adreceu-vos a _____
CARRER VALENCIA, 245. - - BARCELONA

ESPERANTO KAJ LA NACIAJ LINGVOJ

ESPERANTO KAJ KATALUNA LINGVO

Prefikso "mal".

Estus tre interese kompilo raportoj afinecojn inter nia internacia lingvo kaj ĉiuj naciaj lingvoj. Foje oni povas kredi ke tiu aŭ alia esperantaĵo estas tute kaprica, kaj tamen ĝi estas lingva fakto historia, natura, kiu ankoraŭ vivas en iu aŭ kelkaj naciaj lingvoj preskaŭ samforme kiel ĝi aperas en Esperanto.

En Kataluna lingvo troviĝas vortoj *malfiar-se*, *malapte*, *mal(a)-bonança*, *malagradós*, *malapresa*, *malbé*, *malcontent*, *maldestre*, *malguany*, k. a. ĉe kiuj la prefikso *mal* havas ĝuste la saman sencion, kiu Zamenhof enblovis en la Esperantan prefikson *mal*.

Efektive:

KATALUNE

fiar-se
malfiar-se
bonança
mal(a)bonança
agradós
malagradós
apte
malapte
aptesa
malaptesa
bo
malbò
content
malcontent
destre
maldestre
guany
malguany

ESPERANTE

fidi
malfidi
bonvetero
malbonvetero
agrabla
malagrabla
kapabla
malkapabla
kapableco
malkapableco
bona
malbona
kontenta
malkontenta
lerta
mallerta
gajno
malgajno

Kompreneble la prefikso *mal* ne estas uzata en Kataluna lingvo laŭ la sama reguleco kiu faciligas ĝian uzon en Esperanto. Ankaŭ la diritaj katalunaj vortoj laŭ la ĉirkaŭfrazo foje havas alian semantikan nuancon, kiu postulas alian tradukon en Esperanto ol tio supre citita. Tamen oni povas en Kataluna lernolibro pri esperanto komprenigi kaj sentigi la sencion de la Esperanta *mal* per tiuj katalunaj ekzemploj.

En via nacia lingvo, kara kolego, kiuj vortoj prezentas afinecon impresan etimologian kaj morfologian parencecon al Esperanto?

Delfi DALMAU

- Almenys per patriotisme els esperantistes
- catalans haurien de subscriure's a l'única re-
- vista *internacional* que es publica a casa nostra:•

Espero Katolika

Demaneu números de mostra a l'Administració:

COLLELL (per Girona)

ULTRA AQUESTA REVISTA, la

Federació Esperantista Catalana

té un altre òrgan: El micròfon de

Ràdio-Associació de Catalunya

Escolteu les nostres emissions quinzenals,
que tenen lloc des de començament d'any.

*Dies d'emissió: 14 i 28 d'agost, 11 i 25 de
setembre, 9 i 23 d'octubre. Hores de
l'emissió, de les 20'15 a les 20'30. Llarga-
da de l'ona ràdio-telefònica: 251 metres.*

ESPERANTISTES: Col·laboreu
i sosteniu la meritoria tasca de

Ràdio-Associació de Catalunya

A BARCELONA,

PODEU APRENDRE L'ESPERANTO

EN ELS SEGÜENTS LLOCS:

Paco kaj Amo, Planeta, 16. *Barcelona Stelo*, Urgell, 180. *Juneco*, València, 383. *Nova Sento*, Llacuna, 1 (P. N.) *Ateneu Enciclopèdic Popular*, Carme, 30. *Acadèmia Espero*, Muntanya, 62. *Universala Frateco*, Passeig Fabra Puig, 35. *Frateco*, Joaquim Valls, 15. (Les Roquetes S. A.) *Ateneu Llibertari del Clot*, Meridiana, 128. *Akademio Laborista Esperanto*, Galileu, 40. *Liceu Dalmau*, València, 245. *B. O. C.*, *Escola Marxista*, Palau, 6. *Amo kaj Libereco*, Mar, 98. *Esperanta Violeto*, Caçador, 4. *Barcelona Esperantisto*, Hospital, 110 (Ateneu d'Esquerra Republicana) *Zamenhof-Instituto*, Sitjas, 3, pral.

ULTRA AQUESTA REVISTA, la

Federació Esperantista Catalana

té un altre òrgan: El micròfon de

RADIO-ASSOCIACIÓ DE CATALUNYA

Escolteu les nostres emissions quinzenals,
que tenen lloc des de començament d'any,

Dies d'emissió: 5 i 19 de juny; 3, 17 i 31 de juliol.

Hores de l'emissió: de les 19'50 a les 20

Llargada de l'ona ràdio-telefònica: 251 metres

ESPERANTISTES: Col·laboreu i sosteniu la meritoria tasca de

Ràdio-Associació de Catalunya

K. E. F. adherida a U. E. A.

Per acord de l'Assemblea general del 1^r de juliol, la Federació Esperantista Catalana s'ha adherit a U. E. A., reformada pel Conveni de Colònia.

Conseqüentment els membres de K. E. F. ho són automàticament de l'organització universal.

Per aquest sol fet, per la tradició internacional que frueixen

KATALUNA ESPERANTISTO 147

els esperantistes catalans, cal que multipliquem els nostres esforços, amb el fi de representar dignament davant el món esperantista el paper que ens pertoca.

Oportunament seran presentats als federats de Barcelona els rebuts corresponents a U. E. A., pts. 1,25 anuals. No cal dir que els qui ja eren socis d'U. E. A., no hauran de pagar aquest rebut.

Preguem a tots els federats d'altres localitats, en les quals no hi hagi representant, que ens trametin l'esmentada quantitat amb segells de correus.

Mots finals

Confiem que tots els esperantistes es capacitaran de la importància de la nostra crida i que tots respondran com pertoca a tot bon lluitador de l'ideal que defensem. No siguin aquestes, paraules en va. Si responcu a la nostra crida amb entusiasme, nosaltres sabrem respondre també com cal.

Sebastià Alberich Jofrè, Joan Gili Norta, Rafael Gisbert Garcia, Samuel Roca Rodó, Jaume Herp Sanmartí, Emili Carbonell Esplugas, Josep Alberich Jofrè, Josep Banet Tort i Eusebi Pons Martorell.

KATALUNA ESPERANTISTO

MONATA GAZETO

Organo de la KATALUNA ESPERANTISTA FEDERACIO
kaj de la INTERNACIAJ FLORAJ LUDOJ



JANUARO-FEBRUARO 1936

N-ROJ 224-225

DELEGATS

DE

RATALUNA ESPERANTISTA

FEDERACIO

REUS	<i>Enric Aguadè</i>	Vilarroquetes, 2
VILAFRANCA DEL PENEDÈS	<i>Josep Sogas</i>	Duc de la Victòria, 33
GIRONA	<i>Joaquim Vilà</i>	Sta. Eugènia, 30
MANRESA	<i>Angel Llobet</i>	Plaça Major, 20
STA. COLOMA DE FARNERS	<i>Josep Gener</i>	Mossèn Cinto
TERRASSA	<i>Miquel Garriga</i>	Aurora, 12
VENDRELL	<i>Jaume Marcè</i>	Major, 10
VIC	<i>Jacint Comella</i>	Plaça Major, 18
RIPOLL	<i>Ramon A. Soler</i>	Indústria, 18
SABADELL	<i>J. Pinell Mus</i>	Gurreea, 86
STA. COLOMA DE QUERALT	<i>Romà Anseri i Rius</i>	Oficial Secr. Ajuntament
VILASSAR DE MAR	<i>Pere Domènec</i>	St. Ramon, 44
BANYOLES	<i>Joan Aulina</i>	Turers, 49
TARRAGONA	<i>Joan Solè</i>	Major, 29
MANLLEU	<i>Bonaventura Noguer</i>	Dr. Zamenhof
AGRAMUNT	<i>Jaume Argelich</i>	
ROSES	<i>Josep Roig</i>	Elisen Reclús, 32
STA. MGRIDA. DE MONTBUI	<i>Josep Kuadras</i>	Casa Gran
PUIGCERDA	<i>Joan Ravetllat</i>	Ventajola
ST. ANTONI DE VILAMAJOR	<i>Maria Genis</i>	Cuartel, 4
RODA DE TER	<i>Antoni Prat</i>	Bac de Roda

NI PLUE IRAS LA VOJON !

Post 27-jara aperado — ne ĉiam konstanta kaj glata, ĉar okazis intertempe gravaj politikaj kaj sociaj ŝanĝoj en la lando, kaj ankaŭ internaj kvereletoj kaj eĉ etaj skismoj—, **Kataluna Esperantisto**, naskiĝinta en 1910 samtempe kun la tiama Kataluna Esperantista Federacio, kies oficiala organo ĝi fariĝis, **haltis sur la vojo** fine de 1936. La enkonduka noto, kiu aperis unuapage de la revuo (n-ro 232-233, novembro-decembro 1936), titoliĝis **Halto sur la vojo** kaj komenciĝis per la jenaj vortoj:

"La bedaŭrindaj bataloj, kiuj daŭras en nia lando pro la faŝista ribelo, kiu tiom da sango verŝigas, devigas nin halti sur la vojo dum ni atendas la finon de la milito..."

La tragedian sekvon vi ĉiuj konas. Post la kruela milito — dum kiu okazis neeldireblaj krimoj ambaŭflanke (eble la tutmonda esperantistaro pli bone aŭdis aŭ legis pri tiuj, kiujn faris la ribelintaj faŝistoj, sed menciendas ankaŭ, ke de laŭnomaj kontraŭfaŝistoj estis murditaj bonaj esperantistoj katalunaj, kiel pastroj Joan Font-Giralt, Frederic Martí, Andreu Maroé, Fidel Orobiteg, Ramon Arrufat, Miquel Soy, kaj aliaj)—, post tiuj ambaŭflankaj kruelaĵoj, ne okazis vera fino de la milito, precipe ne okazis vera repaciĝo. Okazis nur venko unuflanke, malvenko aliflanke.

La katalunaj esperantistoj, kiaj ajn iliaj antaŭ- aŭ dum-militaj ideoj aŭ preferoj, falis ĉiuj en la vicon de la venkitoj kaj estis duoble suspektindaj: kiel katalunoj, ĉar ili estis defendintaj sian nacian identecon, kio tute kontraŭis la spiriton kaj la leĝojn de reĝimo rekonanta la ekzistojn de nur unu nacio, popolo, lingvo, kulturo interne de la hispana ŝtato; kiel esperantistoj, ĉar Esperanto estis suspektinda ligilo de la ĉiam danĝera internacia proletaro, kaj krome jud-komunista framasonaĵo, kiu minacis la imperian karakteron de la kastilia lingvo, laŭ la vidpunkto de la nova reĝimo.

Al la interhispanaj problemoj tuj aldoniĝis la tutmonda milito kun siaj sekvoj. Kunportis ĉio ĉi profundan elreviĝon kaj malforton en plejparto de la kataluna esperantistaro. Multaj el la antaŭmilitaj aktivuloj estis mortintaj, aliaj estis en ekzilo, aliaj pluvivis sed ne plu aktivis. Tial okazis, ke tiu laŭŝajne nur provizora **halto sur la vojo** daŭris ĝis nun, entute preskaŭ kvardek ses jarojn!

Intertempe la kataluna esperantistaro ne tute silentis, ĉar neniam ĉesis aŭdiĝi ilia voĉo, jen specife kataluna, pere de oficiala saluto al la Universalaj Kongresoj en Varsovio (1937) kaj Londono (1938), jen kune kun hispanaj esperantistoj post kiam oni sukcesis starigi Hispanan Esperanto-Federacion, kies kataluna membraro estis ĉiam proporcie tre grava. Okazis ankaŭ la Renkontiĝoj, unue nur "provincaj" (1957-1972), poste jam katalunaj, kaj diversaj aliaj agadoj sub la respondeco de kluboj, centroj, ateneoj, muzeoj, societoj, bibliotekoj, liceoj, aŭ okaze de prelegoj, ekskursoj, Zamenhof-tagoj, kaj similaj.

Sed mankis ĝis nun la propra organo, per kiu la kataluna esperantistaro aŭdigu senpere sian voĉon, kiel antaŭ tiu malfeliĉa **halto sur la vojo**.

Nun fine, kiam ni estas survoje al plena oficialigo de **Kataluna Esperanto-Asocio**, ni decidis aperigi denove la revuon **Kataluna Esperantisto**, kvazaŭ ĝi estus nura daŭriĝo de la antaŭmilita samnoma revuo, kvazaŭ nenio speciale grava estus okazinta inter 1936 kaj 1982, inter tiu n-ro 233 kaj ĉi tiu n-ro 234...

Samtempe kaj paralele kun la revuo, aperos ankaŭ specialaj suplementoj pri la Internaciaj Floraj Ludoj kaj aliaj beletraĵoj, pri historio, scienco kaj aliaj temoj. ↗

Ni estas entuziasmaj kaj kuraĝaj, sed ankaŭ malfortaj kaj senspertaj. Tial ni fidis la bonvolan indulgemon de niaj legantoj. Same kiel skribite en januaro-aprilo 1910 – unua numero de *Kataluna Esperantisto* – ni nun diras:

"Vi, la eksterlandaj gazetoj, ĉefe la hispanaj, volu ankaŭ akcepti nian sinceran saluton, kaj volu cedi lokon simplan en via honorinda rondo al tiu areto malsperta, juna kaj humila, sed fervora kaj entuziasma, kiu celas, kiel vi, la venkon de Esperanto!"

Manuel Casanoves i Casals

24a KATALUNA ESPERANTO-RENKONTIĜO
22aj INTERNACIAJ FLORAJ LUDOJ
Reus (Baix Camp), la 25an kaj 26an de septembro 1982

La programon de la Renkontiĝo kaj aliĝilon vi ricevos komence de septembro. Nun, jen la

PROVIZORA PROGRAMO

- Sabaton, la 25an* ● *Esperanto-Ekspozicio* ● *Tendaro de Kataluna Esperanto-Junularo*
Dimanĉon, la 26an ● *Akceptado de la partoprenantoj far la Urbestro de Reus* ● *22aj Internaciaj Floraj Ludoj*
● *Folkloro kaj Arta prezentadoj* ● *Bankedo*

Ĉiuj aranĝoj, krom la Tendaro, okazos en CENTRE DE LECTURA de REUS, carrer Major 115. Pastro Casanoves faros Meson en Esperanto, je la 9a, en la preĝejo Sankta Petro (Església Prioral) de Reus.

Kataluna Esperantisto

NUMERO 325 (91)
KVINA EPOKO
JANUARO-MARTO
2003

*"Temas nur pri provizora
momento"*

Movada radiografio

Kun la socio, kontraŭ la milito, por la libero de esprimo

Nia asocio deziras esti socie aktiva kaj nete malneŭtrala, kiam oni lezas la homajn kaj lingvajn rajtojn. Ĝi tial firme aliĝis al la vasta kontraŭmilita movado: ĝi aliĝis al la Platformo "Ni haltigu la militon" kune kun pli ol 200 aliaj asocioj. Ĝi organizis kun la esperanto-fako de la barcelona Klubo de Amikoj de Unesko prelegon de Lluís Garcia, prezidanto de Kataluna Esperanto-Junularo, pri la fono de la konflikto, kaj ĝi spirite kunmarŝis en la grandioza manifestacio en Barcelono sub la granda afiŝo profesinivele kreita de Barcelona Esperanto-Kontakto. Bedaŭrinde tiaj paloj de miloj da homoj en la tuta mondo ŝajne ne sufiĉas por haltigi agresadon de Usono kaj ĝiaj komplicoj: necesas plu vigli.

Kvankam en tute aliaj proporcioj, la jaĝa fermo de la eŭskalingva ĵurnalo *Euskaldunon Eguskarria*, en sufiĉe malregulaj cirkonstancoj, falas en similan rajto-lezadon. Tial multaj voĉoj laŭtis kontraŭ ĝi zialande, inter ili preskaŭ ĉiuj katalanlingvaj ĵurnaloj (inkluzive de la plej legataj) kaj la kolegio de ĵurnalistoj. Nia asembleo decidis subteni tiujn protestojn, kaj KEA subskribis la manifeston lanĉitan de diversaj gazetoj kaj politikaj partioj.

Estus bele imagi, ke similaj eventoj de nun ne plu okazos, sed nur supraj rigardoj ĉirkaŭ ni evidentigas, ke multego ankoraŭ faencas. Nia deziro, kun via helpo, estas ĉiam stari fronte kaj rezolote. ☐

Cent anys d'Esperanto
als Països Catalans

ESPERANTO*
CAT

*Associació Catalana d'Esperanto
Kataluna Esperanto-Asocio
